

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Nuna situacio
Claude Gacond, 318-a radioprelego, 1969.11.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj aŭ ILEI renaskiĝas. Tio nur povas kontentigi la instruistojn, kiuj kampanjas por la enkonduko de esperanto en la lerneajn programojn. En Helsinko, sub la prezido de sinjoro Raif Markarian, okazis unu kunsido de la Estraro de ILEI la 27-an de julio, du kunsidoj de la Komitato de ILEI la 28-an de julio kaj la 1-an de aŭgusto kaj unu publika kunsido de ILEI la 29-an de julio. Ni provos raporti pri la ĉefaj decidoj de tiuj kvar kunsidoj.

A.- Pro diversaj malfacilaĵoj la organo *Edukado Internacia*, kiu neniam tute kontentige funkciis, ne plu aperos. La Estraro de ILEI dankis al sinjoro Oskar Svantesson pro la laboro farita. Tiun multobligitan organon anstataŭos parte cirkuleroj, kiujn dissendos la Ĝenerala Sekretario de ILEI kaj parte nova *Internacia Pedagogia Revuo*.

Cl.- ILEI provos eldoni tiun gazeton ekde 1970. La ĉefredaktoro estos rektoro Helmut Sonnabend. Ĝis nun sin jam anoncis 300 abonantoj, sed minimume 1000 abonantoj estas necesaj. Ĉiujare la sekcioj de ILEI estos petataj verki almenaŭ du artikolojn por la organo *Internacia Pedagogia Revuo*. Se oni atingos 1000 abonantojn, la kosto de ĉiu kajero de la revuo maksimume estos je 4 steloj.

A.- Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiu estas landa sekcio de ILEI, estis aboninta ĉiujn siajn aktivajn membrojn al *Edukado Internacia*. Dum kunveno ĝi devos diskuti la aboniĝon al la nova *Internacia Pedagogia Revuo*.

Cl.- ILEI konas financajn malfacilaĵojn pro la tiel nomataj nepagipovaj landoj. Pro tio ILEI provos eldoni sian novan organon *Internacia Pedagogia Revuo* en Orienta Germanio, verŝajne en Stettin. Tiel ĝi povos atingi la duoblan rezulton, elspezi en komunista lando la kotizojn de la komunistaj landaj sekcioj kaj permesi al la instruistoj, kiuj loĝas en tiuj landoj, aboniĝi al tiu revuo. Ni esperas, ke tiu projekto sukcesos kaj resanigos la financojn de ILEI.

A.- Unu sola komitata kunsido en la jaro kaj unu sola publika kunsido ne sufiĉas por permesi la diskutadon kaj la pritraktadon de la gravaj problemoj de la esperantista instruistaro kaj de la instruado de esperanto. Pro tio ILEI estonte aranĝos Instruistajn Konferencojn.

Cl.- La venonta Internacia Instruista Konferenco okazos en Maribor, Jugoslavio. Al tiu konferenco, kiu daŭros de la 28-a ĝis la 31-a de julio 1970, povos partopreni ĉiuj instruistoj.

A.- La Asembleo de ILEI okazos dum tiu kongreso. Ĝin partoprenos la delegitoj de la landaj sekcioj laŭ tiu normo : ĝis 30 membroj, unu delegito ; ĝis 60 membroj, du delegitoj, ĝis 90 membroj, tri delegitoj, kaj tiel plu. Esperanto-Edukistaro de Svislando rajtos sendi unu delegiton.

Cl.- Nuntempe ILEI havas sekciojn en Aŭstralio, Aŭstrio, Britio, Bulgario, Danlando, Finnlando, Francio, Okcidenta Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono. Entute estas 17 landoj.

A.- Ĉar dum la pasintaj jaroj ILEI malvigligis, kelkaj sekcioj ĉesis pagi sian jaran kotizon, kiu estas nun je duonguldeno. Ekzemple Esperanto-Edukistaro de Svislando ne plu pagis sian jaran kotizon ekde 1964. Nun tiu kotiz-afero rapide ordiĝos, ĉar en la nova statuto de ILEI, kiu estis akceptita en Helsinko, artikolo diras : « *La membriĝo en la Ligo ĉesas per a. Libervola eksiĝo de la sekcio ; b. Dujara ne pago de la kotizo ; c. Kontraŭstatuta agado.*

Cl.- Estis bone, ke ILEI renovigis sian statuton, ĉar la antaŭa estis komplika, kio malfaciligis la laboron de la Ligo. La estraro, kiu estis elektita en Madrid la pasintan jaron, kunsidis

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Nuna situacio
Claude Gacond, 318-a radioprelego, 1969.11.12 & 15

dufoje, en Londono kaj en Helsinki, por diskuti la novan statuton, plani la reorganizon de la Ligo kaj pretigi efektivegeblan laborprogramon.

A.- Por la unua fojo ILEI sukcesis havi sufiĉe kompletan statistikon pri la esperanto-instruado en la lernejoj de la tuta mondo. Tiu statistiko, laŭ interkonsento, estos uzata de Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA kaj de ILEI mem, kaj ILEI preparos novan statistikon por la lerneja jaro 1970-1971.

Cl.- Kion diris tiu statistika enketo? En la lasta lerneja jaro 1968-1969 ĉirkaŭ 17'000 gelernantoj en 500 lernejoj en 32 landoj lernis esperanton.

A.- Dum la pasinta jaro ILEI havis kontaktojn kun instruistoj en Sudkoreio, Kanado, Israelo, Ĉeĥoslovakio kaj Sudafriko. ILEI esperas, ke en tiuj landoj stariĝos novaj sekcioj.

Cl.- ILEI, krom siaj intereso pri la instruado, turnis sian atenton al la eldono de infan-libroj. La manko de infan-literaturo malhelpas la instruadon de esperanto en la lernejoj. Ĝi same deziras helpi al la aranĝo de infan-ferio kaj al la reorganizo de infan-kongreseto dum la Universalaj Kongresoj. Ĝi deziras kunordigi la interlernejajn interŝanĝojn. La preparado de kompleta pedagogia vortaro estas unu el la punktoj de ĝia labor-programo. Jen multaj taskoj, kiuj efektiviĝos, nur se la landaj sekcioj alportos sian aktivan kunlaboron. Kaj eble ne nur la landaj sekcioj, sed ankaŭ la aliaj esperantistaj societoj kaj la unuopaj esperantistoj. Ekzemple *Internacia Pedagogia Revuo* bezonas abonantojn kaj la infan-libroj aĉetantojn kaj la infan-manifestacioj gvidantojn. Tiuj abonantoj, aĉetantoj kaj gvidantoj ne necese devas esti instruistoj.

A.- En Svislando la esperantista instruistaro ankaŭ troviĝas en reorganiza etapo. Esperanto-Edukistaro de Svislando naskis la Kulturan Centron Esperantistan, pri kies kreo ni raportis en septembro. Nun Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiu estas malŝarĝita de la ne-faka laboro, povos sin turni ekskluzive al la profesia okupo. Sed tio bezonas replanadon de la laboro.

Cl.- Esperantio estas granda korpo, kies organoj estas la diversaj fakaj kaj regionaj societoj. Tiu granda korpo bone fartas, nur kiam ĉiuj societoj bone fartas. Dum la pasintaj jaroj Esperantio malsanetis pro la malbona farto de ILEI. Ni esperas, ke de nun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj komplete resaniĝos kaj tiel permesos novajn progresojn en la disvastigo de esperanto en la lernejojn.

A.- La instruado de esperanto estas sufiĉe kompleksa afero. Ni pensas vin interesi dediĉante dum tiu ĉi vintro kelkajn elsendojn al tiu fako.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-